

Tago de la Esperanta Libro 2024

ILEI prezentas la “rondirantan rakonton”

Pri viroj kaj kunikloj¹

Mi staris antaŭ rozkolora palaco, kun malfermitaj fenestroj.

“Antaŭ la eltrovo de telefonoj ne eblis ĉielskrapuloj.” Tiu frazo trapasis mian kapon.

Mi jam malfruis por la rendezuo...

“Pensu, pensu... pensu, diable.” Mi bezonas la poŝtelefonon por diri pri mia malfruo, aŭ plej minimume, almenaŭ memori tiun damnan numeron... Oni bezonas apartan talenton por faligi ĝin en la etetan mallarĝan truon de la profunda lifta puto, kaj mi, evidente posedas ĝin. Mi imagas ĝin frakasita en mil brilantajn pecojn. Eble, ĝi mortigis iun raton, falinte en la profundegon de tiu 42-etaĝa konstruaĝejo...

Mi ne plu pensas pri la rendezuo kaj kuras malsupren laŭ la ŝtuparo ĝis la kelo, ĉe la lifta puto, por serĉi la poŝtelefonon Mi atente rigardas, kaj jen ĝi.... La poŝtelefono, mirakle, estas tie ĉi, apud io sed kio ĝi estas?

Prezente la telefonon, kiu evidente havas rompitan ekranon kaj pro tio ne plu funkcias, scivolemo venkas min, kaj mi prenas ankaŭ alian objekton, kiu ŝajnas esti leda monujo, preskaŭ nova, kaj plena de monbiletoj.

Estas ankaŭ dokumentoj, sed eble ili estas tro multaj. Tri stirrajtigiloj, tri rekonkartoj, dek kreditkartoj Kies ĝi estus?

Tuj mi memoras, ke antaŭ unu semajno en ĉi tiu palaco, je la 40-a etaĝo, kie troviĝas la oficejoj de tre konata advokato, iu agresis lian sekretariinon kaj ŝtelis kelkajn gravajn dokumentojn, aŭ tion oni oficiale diris.

Sed oni diras ke en ĉi tiu oficejo okazas nokte strangaj aferoj, vetoj, hazardludoj Nu, aferoj, kiujn respektinda advokato ne devus fari; eble mi trovas komencon de enigmo.

Ja ne estis mia intenco malkovri kion estas faranta tiu ĉi advokato. Pli bone estas reveni kiel eble plej rapide al mia loĝejo, kie vivas miaj du kunikloj. Ili estas fratoj, sed havas malsamajn felojn. La unua kuniklo estas malhelbruna kaj la alia preskaŭ nigra, sed ambaŭ havas tre ĉarmajn preskaŭ blankajn vostetojn. Kiam ili kuretas tra la loĝejo, videblas nur iliaj vostetoj. Mi ege ŝatas tuŝeti ilian molan felon kaj ŝajnas, ke ankaŭ ili de tempo al tempo aprecas miajn karesojn.

Kiam mi fermas la pordon, la problemoj de la mondo restas ekstere. Sed...mi ja havas tiun pezan monujon. Kion fari pri ĝi? Ĉu mi portu ĝin al la polico? Kaj se mi ne riparas mian telefonon, mi ne povos pardonpeti al tiu knabino, kiu malgraŭ ĉio ŝajnis simpatia.

Mi decidis iri al la proksima kafejo por uzi ilian telefonon kaj provi kontakti ŝin. Kiam mi finfine sukcesis trovi ŝian numeron kaj vokon, mi pardonpetis per “Saluton, mi tre bedaŭras pro malfruo. Mi havis neatenditan okazaĵon kaj perdis mian poŝtelefonon en la plej absurda maniero.” Ŝi silente

¹ La rondiranta rakonto “Pri viroj kaj kunikloj” estas iniciato de la nove restariĝinta Komisiono pri Virina Agado de UEA. Ĝis la 20-a de novembro 2024 verkis ĝin 31 virinoj el 12 landoj (Armenio, Barato, Ĉinio, Francio, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Kroatio, Madagaskaro, Pollando, Svislando). Zorgas pri ĝi Alessandra Madella. Verkemulinoj estas tre bonvenaj kaj povas kontakti ŝin ĉe: aminafuji2@yahoo.it

aŭskultis dum mi klarigis ĉion, inkluzive de la monujo. Mi demandis, ĉu ni povus fiksi novan daton, esperante, ke mia honesta konfeso gajnos ŝian simpatian.

Ŝi daŭre silentis. Dum mi atendis ŝian respondon, mia cerbo plenis je pensoj pri la kunikloj. Jam estis ilia vespermanĝa horo. “Kial ŝi ne parolas, ĉu ĉio enordas ĉe ŝi aŭ ĉu estas iu problemo aŭ ĉu estas nur problemo de telefono, kiel mi povas helpi ŝin, oh mi ankaŭ devas zorgi pri la malsataj kunikloj, ve ne estas manĝaĵo hejme, kial ŝi ne parolas, survoje hejme mi devas aĉeti legomojn por la kunikloj...” estis ĥaosa senĉesa parolo en lia cerbo kaj tio estis rompita de SALUTON el alia flanko per la telefono.

Finfine, jen vorto: neformala saluto. Ĉiuj demandoj, kiuj sturmis lian cerbon, malaperis en momento. La voĉo el la alia flanko de la telefono diris: “Mi estas scivolema aŭdi de vi, kiel vi perdis vian telefonon. Ĉi tio tute ne sonas kiel improvizita preteksto, sed mi devas rigardi vin en la vizaĝo, dum vi parolas pri via travivaĵo, por kompreni ĉu vi diras la veron.” Ŝi pravis. Estis pli bone tuj klarigi, eble inviti ŝin al vespermanĝo kaj ne maltrafi la okazon vidi ŝin. Sed kion fari pri la legomoj por la kunikloj? Tio vere ne estas problemego, ĉar gravas, ke la kunikloj havas akvon kaj fojnon.

Vere, la kunikloj ne suferos, sed mi havas serion da gravaj problemoj: mi ne havas sufiĉe da mono por inviti ŝin al bona restoracio, mi ne scias kiel kuiri, kaj mia motivaĵo rapide malkreskas. Ĉu mi vere bezonas renkonti ŝin por klarigi? Ĉu mi ne povus simple daŭrigi mian vivon, sen doni al ŝi klarigojn, ŝajnigante ke mi neniam aŭdis pri ŝi? Kaj mi volas ekscii ion pri tiu monujo plena je dokumentoj! Tio ŝajnas al mi pli kaj pli urĝa, interesa, grava... fundamenta afero!

Mi prenas mian poŝtelefonon... Damne, ĝi ne funkcias!

Mi tamen sentas iom da orgojlo, ke ŝi pretas kredi tiun absurdan historion. Eble ŝi vere ŝatas min. Ĉu ne estas tiu nova etiopa kafejo, proksime de la norda stacidomo, kie oni manĝas per manoj de komuna plado? La kelneroj estas afablaj, precipe kun belaj knabinoj. Kaj ili ankoraŭ havas malaltajn prezojn pro la lanĉ-periodo: poste tiuj etnaj restoracioj ĉiam iĝas multekostegaj.

Afabla kelnero alproksimiĝas al mi, li pruntedonas al mi sian telefonon, tiel ke mi povu inviti ŝin al tiu bela etiopa kafejo, kun grandaj palmarboj ekstere.

Ĉu ŝi venos aŭ ne? Ŝi diris al mi, ke ŝi alvenos tuj, sed mi atendas jam unu horon... Hodiaŭ la trafiko ŝajnas esti tre intensa: tio okazas ĉiam, kiam parlamentkunsidoj disvolviĝas. Mi trarigardas la menuon... jen, kompreneble la prezoj jam plialtiĝis... sed en stato de neceso mi povus prunti monbileton de la leda monujo... mi pensas, ke mi prenos vegetaranan manĝaĵon... jes...yetsom beyaynetu!

La pordo malfermiĝas, sed ŝi ne estas sola... kune eniras la restoracion alta, tre eleganta knabo... nekredeble... sur lia kravato estas gladpresataj rozkoloraj kunikloj.

Mi gapas, kaj eĉ se mi volus, mi ne sukcesus moviĝi, ekstari, foriri. Komence de tiu ĉi absurda tago – sed ĉu ĉio ĉi komenciĝis tage, aŭ nokte? Mi nun konfuziĝas, ne plu memoras, kaj cetere tio ne vere gravas – mi pensis ke mi estis ĵetita en enigmon. Sed tio tute ne veras. Mi troviĝas meze de ŝerco aŭ, por esti pli preciza – vortoj ja gravas – meze de farso. Farso en kiu mi rolas kiel stulta, senutila arlekeno ridindiginda de ĉiuj, trigroŝa spektakleto en kiu mi ne estas multe pli ol marioneto.

Mia cerbo komencis turniĝi en mia kapo kaj mi provis al mi mem klarigi la situacion. Kion fari, kion elpensi? Ĉu eskapi de la restoracio aŭ daŭre sidi algluiĝinte al seĝo kun stulta rideto, aŭ...? Kaj

subite bona ideo aperis en mia tuj heliĝinta konscio. Mi ĵetis min al la juna belulo kun vortoj: “Ho, mia kara kuzo, kiom longe mi vin atendis!”

Mi sentis la adrenalinon kreski, preta al kiu ajn atako aŭ defendo, dum mi atendis lian respondon, ĉiam kun ŝajne suna rideto frostita sur miaj lipoj. Dume per la angulo de miaj okuloj mi ŝtelrigardis mian belulinon, kiu skuis sian afrik-stilan hararon kaj aspektis kiel nelegebla rano malantaŭ siaj grandegaj okulvitroj. La dolĉa moko de Mona Lisa, kiu dum unu momento forgesis demandi al la mondo sian eternan “Kial?” Sed li, forta kiel roko, respondis per voĉo de ĵus plenkreskinta junulo: “Vi eraras, Sinjoro. Mi havas tre komunan vizaĝon. Mi aŭdis, ke la grekaj dioj vizitis Etiopion por manĝi. Bonkore de vi inviti nin!” Kaj li elegante donis sian kunikl-forman promen-bastonon al la alproksimiĝinta kelnero.

Jen komenciĝis stranga kunsido. Mi, ŝi, kaj la juna viro. Mia stranga tago, kiu ŝajnas kiel iu sonĝo dum tagmeza dormeto, ankoraŭ ne finiĝis. Ni tri sidis ĉe la tablo.

Ĝis nun, mia amikino diris nenion. Kaj, mi, ankaŭ ne scias, kion diri. Estas la viro, kiu rompis la mallongan silenton.

“Mi aŭdis, ke antaŭ ol vi emeritiĝis, vi laboris kiel privata detektivo dum 30 jaroj.

Pasintan dimanĉon, mia kuzino iris konsulti advokaton, kiu loĝas en la sama konstruaĵo, kie vi trovis la monujon, pri io. Sed ekde tiam mi ne plu sukcesas kontakti ŝin. Ĉu vi bonvolus helpi min esplori? Mia familio tre zorgas pri ŝi kaj mi esperas, ke nenio okazis al ŝi.

Pardonu, mia nomo estas Leon.”

Prenante botelon de Ŝiraza vino, mi verŝis ĝin abunde en mian grandan glason kaj rapide englutis ĝin. Elegante kaj rafinite, ŝi pluverŝis ĝin al mi, al la junulo kaj al si mem. Ŝi faris tion plurfoje. Eble ŝi volis ruinigi min el la ekonomia vidpunkto, sed finfine mi vidis rideton sur ŝia vizaĝo. Ŝi ĉiam surhavis la grandegajn okulvitrojn.

Mi ja havas la monujon, kvankam ĝi ne estas la mia. Alvenas la kelnero kaj mi mendas multe da bongustaĵoj, invitante la aliajn mendi tion, kion ili volas. Mi ankoraŭ ne respondis al la junulo. Mi ne povas akcepti laboron sen demandi pli. Kaj la vino donas al mi kuraĝon, do mi vere ŝatus alproksimiĝi pli multe al ŝi. Kiel oni diras: por ke la amikeco restu plena, glaseto iru kaj glaseto venu...

Sed mi ne povas diri al ŝi ion ajn, ĉar ĉeestas la alia viro. Kiam alvenas la pladoj, estas la junulo kun la kravato kun la kunikloj, kiu denove parolas: “Mi ne vere ŝatas tiun ĉi viandon, ĉar en mia lando oni kuiras ĝin multe pli bone. Mi loĝas en bela lando, en granda domo kun multe da kunikloj kaj aliaj bestoj. Mi volas inviti vin kaj mian amikinon tien. Vi estos miaj gastoj, kiam ajn vi volas!”

Verdire mi nur duone aŭskultis lin, ĉar mi estis tute ravita de ŝia manĝmaniero. Ŝi atingis la glaciaĵon kaj sin ĵetis sur ĝin kiel se ne estus morgaŭo. Preskaŭ ĉe la fino ŝi haltis, suspiris kaj komencis gustumi ĉiun kulerplenon de acid-ĉeriza kremo kun lantaj movoj kaj fermitaj okuloj. Ŝajnis al mi vidi larmojn brileti malantaŭ la rondaj okulvitroj. Subite niaj okuloj kungluiĝis trans la tablo. Ŝiaj unuaj vortoj de la vespero estis: “Emerita, ĉu? Vi ne ŝajnas tiel maljuna...”

“Por emeritiĝi oni ne nepre devas esti maljuna”, mi respondis, pensante pri miaj nankunikloj. Speciale Spidi atendas mian hejmvendon por ricevi manĝon, tuŝadon kaj alparolon. Aliflanke, ambaŭ interesas min: ŝi kiel virino kaj li pro lia intereso pri kunikloj kaj la eble interesa okazo ĉe la advokato, rilate al lia kuzino. Ĉu la trovita monujo rilatas al la advokato en la 40-a etaĝo?

Kion fari nun? Ambaŭ ŝajnas ĉiam pli misteraj, kiel la nuna hipnota etoso dum vespermanĝo. Ŝi tuj ravis min hieraŭ en tiu stranga veturakcidento. Ĉu ĝi vere okazis hazarde? Kaj nun ŝi venas kun tiu akompananto, ne prezentante lin...

Li, la neatendita Leon, kun rozkoloraj kunikloj surkravate, multon scias pri la vivo en la ĉielskrapulo, pri la riĉa monujo...

Mi decidis inviti ilin reiri kune surloken por fini la vesperon. Fakte, mi esperas malkovri iujn ajn spurojn.

Li tuj akceptas mian sugeston kaj stariĝas lasante sur la tablo abundan trinkmonon. Li reakiras sian kuniklo-forman bastonon de la kelneroj, kiuj svarmas ĉirkaŭ lin kiel muŝoj al mielo. Kaj li triumfe eliras batante per ĝi larĝan ritmon en la aero, kiel ĉef-komponisto de la Sunreĝo, kantante per ankoraŭ ne plene formita tenora voĉo la vortojn de la “Amuzema vidvino”: “Pezas inojn kompreni al vir’/ Ili nur portas nin al disŝir’...”.

Dume ŝi restas kun mi malantaŭe kaj fiksas min serioze: “Kial vi iris al tiu palaco anstataŭ veni al nia rendevuo?” Mi subite ekkonscias, ke en miaj longaj klarigoj mi tute forlasis tiun parton, kaj mi intime sentas, ke mi ŝuldas al ŝi respondon.

Ŝi eble timas, ke mi havas alian belulinon, sed tio ne estas vera. Mi fakte volis nur helpi Jackson, maljunan viron sen filoj je la 42-a etaĝo. Li estas iama kantisto, kiu kelkfoje pensas pri memmortigo, kaj li donacis al mi miajn du belegajn kuniklojn. Mi kaptis la ŝancon trapasi tie por vidi kiel li fartas, sed li ŝajne tiam ne ĉeestis, ĉar li ne respondis al miaj sonorigadoj kaj pordofrapoj.

Mi vidas riproĉon en ŝiaj okuloj kaj mi daŭrigas: “Li malamegas telefonojn, do tiel mi ne povis kontroli. Eble pro la zorgo mi faligis mian poŝtelefonon en la liftoputon, sed mi ne pensas, ke li mortigis sin mem. Li havas spektaklan karakteron kaj, kiam li estas en suicida mensostato, li sendas al mi parfumitajn poemojn en ĉina kaligrafio kaj ludadas frostotremigajn muzikojn sur sia stereofonia aparato. Ĉi foje li verŝajne nur iris butikumi, sed ni nepre vizitu lin unue.”

Dume, Leon sukcesis haltigi taksion kaj ni enaŭtiĝis.

Ĉapitro 2: Ĉio en la mondo rondas

Mi lasis ilin sidiĝi malantaŭen. Sed ni neniam alvenis al la palaco, ĉar ni havis akcidenton survoje. Nia ŝoforo vundiĝis kaj ni devis akompani lin al la hospitalo. Kiam ni eniris, granda estis mia surprizo! Fakte, sur lito en la najbara ĉambro, tra la apenaŭ malfermita pordo, mi vidis Jackson.

Lasante al aliaj du akompani la ŝoforon, mi eniris en la ĉambron kie kuŝas Jackson. Ŝajne la ĉambro estas por du pacientoj, kaj en la antaŭa lito kviete dormas Jackson. Mi alproksimiĝis al lia lito; li dormas kun trankvila vizaĝo sed lia kapo estas bandaĝita. Kio diable okazis al li? Ĉu li finfine memmortigis sin? Eĉ ne povante voki lin, mi restis staranta. Tiam alparolis min mezaĝa viro kun ronda vizaĝo, kun hela vizaĝkoloro por paciento, kiu legas libron en malantaŭa lito. “Oni nur nun sukcesis kontakti vin, ĉu? Vi devas esti lia filo.”

“Vi supozas malĝuste: mi estas amiko lia.” Subite Jackson eliras el sia dormo, malfermas la okulojn, vidas min kaj komencas flustre rakonti: “Mi estis tiom trista, tiom sola, tiom deprimema, mi volis forlasi mian senesperan vivon. Mi volis trovi diskon de la fama kantisto Manuel por akompani mian sinmortigon, sed serĉante la diskon, mi glitis, falis kaj vundis mian kapon. Nun flegistoj klopodas resanigi min, tamen mi deziras morti....”

“Ne, ne, mia amiko, vi ne povas morti. Vi resaniĝos baldaŭ.” – mi respondas, milde brakumante mian amikon. Subite li kaptas mian manon kaj paroletas: "Helpu al mi. Helpu al mi. Serĉu mian filon... Kunikloj, kunikloj... Kunikloj helpos al vi...." Lia voĉo malfortiĝas. Li svenas...

Mi restas silenta. Mi ne povas moviĝi. “Filo... kunikloj...?” – Mi klopodas kolekti miajn pensojn... Subite mi vidas flegistinojn... Mi devas forlasi la ĉambron... Mi komprenas nenion...

...Nenion...Mi do eniras la najbaran ĉambron, kie kuŝas la ŝoforo de la taksio, Ŝi sidas ĉe la lito, sed Leon malaperis.

“Leon, Leon, Leon, sed ne estas tiu nomo, kiu estas gravurita sur la kuniklo-forma bastono de Leon.” Mi nun memoras, ke mi ja vidis “Jackson”, kiam elirante la etiopan kafejon, Leon ritmis en la aero per ĝi, kiel ĉef-komponisto. “Strange, ĉu ne?” Plie, ĉu Jackson sinvundis, ĉu iu kapfrapis lin? Ĉu la kuzino de Leon, kiu malaperis? Ju pli da demandoj, des malpli da respondoj... Mi tuj demandu al ŝi, kie estas Leon, por ke mi sciu pli pri ties kuzino.

Sed mia belulino ne respondis, kompatoplene ensorbita en la kuŝantan viron. Simile, kiam hieraŭ matene basenpleno da malplura akvo el supra fenestro faligis min el la biciklo, ŝi tuj alkuris, lasante sakon da pomoj disfali sur la trotuaron kaj la truplenan vojon. Malseka, ŝokita kaj hontema, mi nur kapablis balbuti “Amos”, donante al ŝi la manon. Ŝi longe fiksrigardis min, el malantaŭ la okulvitroj, kaj kun varma rideto respondis: “Ĉu nomo aŭ promeso?” Inter tiom da pomoj, mi ĝoje stultis kiel Adamo en la edena paradizo, preta saltegi trans la muron por akiri liberon. Ŝi daŭrigis: “Mi estas Maja. Plezuro.”

Sed for la babiloj! Mi devas enketi pri malaperinta knabino kaj pri la mistera monujo. Leon preskaŭ dungis min kaj mia ekslaboro plaĉis al mi, kelkfoje amuzis min. Krome, la aferoj okazis ene de palacego kie loĝas tri virinoj, kun kiuj iam mi “interrilatigis”, do mi povos ilin pridemandi. Ĵus alveninte al mia apartamento mi ludis nur kelkajn minutojn kun la kunikletoj, ĉar subite mi memoris, ke la administranto de la palacego ŝuldas al mi favoron. Do, mi mesaĝe petis al li la registrarojn de la kameraoj lokitaj sur fasado. Kaj jen! Dum mi rigardis dimanĉan registradon, sur la ekrano aperas Leon (sen bastono) kun malalta knabino: ili haltas antaŭ la pordego dum minutoj, serioze interparolantaj. Poste la knabino prenas ion el la mansaketo kaj svingas ĝin antaŭ la vizaĝo de Leon: ĝi ŝajnas la monujo!

Kiel? Kio okazis? Unu palaco kun kvar misteroj: kie malaperis la kuzino de Leon, kiu eniris en la palacon; kiel la monujo de ekstere iris enen; kiel la bastono kun la nomo de “Jackson” finiĝis eksteren en la manoj de Leon; kaj finfine kiel malaperis la filo de Jackson? Kiel kunikloj povus helpi trovi lian filon? Ili ne parolas, kvankam ili eble povis vidi, kio okazis kun la filo. Mi memoras ke, dum mia infanaĝo, ciganinoj kutimis rakonti sortojn uzante kuniklojn, kiuj tiris paperojn kun solvoj al demandoj el korbo. Aŭ ĉu tiuj estis kobajoj? Mi ne konas bone la bestojn, eble mi miksis. En ĉiu okazo, mi povas provi. Kion alian? Eble “Cherchez la femme” (Serĉu la virinon). En tiu granda ĉielskrapulo certe loĝas multaj virinoj, sed mi konas nur tri. Sufiĉe, se ili povos esti utilaj.

Jam estis funda punkto kaj, malgraŭ la ekscitiĝo, mi devis iom dormi por reakiri fortojn, helpata de krizantema teo. Antaŭ ol plongi en la sonĝan mondon, mi revidis kiel mi renkontis la tri virinojn. Mi estis en tombejo por enketi pri drog-trafiko kaj, timante esti rekonata de mafiuloj, mi enmiksigis en sufiĉe dezertan entombigan ceremonion. La tri virinoj estis la vidvino, la fratino kaj la 100-jara patrino de iu arkitekto Ventumilo, kiuj, vidante min singulti kun kovrita vizaĝo, pensis, ke mi estis tre kara amiko de ilia forpasinta karulo. De tiam mi kelkfoje vizitis ilin en la palacego, portante

blankajn liliojn kaj trinkante delican sensukeran kafon, por komforti ilin per miaj rakonkoj pri kiel mi fiŝkaptis trutojn kaj tinkojn kun la beata estinto. Sed mi neniam prezentis ilin al Jackson, kiu certe timegus, ke la zorgoj de tri virinoj kuracus lin de lia melankolio, kiu ja estas la nemalhavebla fonto de lia kreemo.

Kiam la vento blovas, mi milde malfermas la pordon de mia koro. Mi vicigas antaŭ mi unu post la alia la bildojn de mia vivo, kiun mi travivis, la homojn kun kiuj mi estis en kontakto...jes mi estis feliĉa kaj la feliĉoj estis pli ol feliĉaj ...ĉar mia feliĉo dependas nek de la ŝanĝiĝo de la vetero, nek de la aliaj kazoj. Mia feliĉo radikas en mia koro, ĝi estas nmovebla, ĝi radikas en mia ekzistado kaj en la ĉeesto de multaj amikoj, precipe tiuj en la palaco. Sufiĉe! La ĉeesto de ĉi tiuj amoj de miaj amikoj sufiĉas por feliĉigi min. Sed amo ne sufiĉas, mi ankaŭ bezonas miajn kuniklojn. Miaj kuniklaj amikoj ofte estas lasitaj solaj en mia domo, sed ili restas en mia koro.

Kaj estas Maja, tiu stranga belulino, kiu parolas tiel malmulte, sed kiu regas min per la plej etaj brovoŝanĝoj kaj per siaj frostaj kaj varmaj rigardoj ĝis la fundo de mia animo. Kiam ni renkontiĝis ŝi skribis sian telefonnumeron sur pomon (kiun poste miaj kunikloj manĝis) kaj mi tuj oferis al ŝi mian koron en granda bankedo. “Voku min, mi tre zorgas”, ŝi diris. Kaj hodiaŭ mi malafable forlasis la hospitalon sen saluti ŝin.

Ŝi kaptis min per sia filozofia penso, ĉar laŭ ŝi ĉio en la mondo rondas. Post mallumo venas lumo, post malĝojo reaperas ĝojo, post falo de la biciklo povas okazi interkonatiĝo, kiu ŝanĝas la vivon.

La teo de krizantemo efikis kaj mi plonĝis en la sonĝan mondon kun rideto sur la vizaĝo. Certe mi revidos Majan kaj mian karan amikon Jackson. En la sonĝa mondo mia nankunikleto Spidi flustras al mi: “Vi trovos la filon. Vi trovos la filon.”

(daŭrigota post la 15-a de decembro 2024...)